sveda esperanto kongreso 2019
31 majo–2 junio
Stokholmo

# Programo

## Vendrede 31 majo 2019

10.00 Kafo kaj registriĝo
10.45 Malfermo de la kongreso
11.00 Christer Kiselman: La jidogramatiko de Zamenhof kaj liaj kvin planlingvoj
12.00 Lunĉopaŭzo
13.00 Jarkunveno de Eldona Societo Esperanto kun raporto pri la prilaborata Esperanto-sveda vortaro
14.00 Mireille Grosjean: Tra centraziaj stepoj
15.00 Kafo
15.30 Mireille Grosjean: Esperanto en Afriko
17.00 Manĝo
18.00-20.00 Koncerto kaj/aŭ komuna kantado

## Sabate 1 junio 2019

10.00 Prelegoj pri la temo minoritataj lingvoj en Svedio
- Tatu Lehtilä pri Sveda signolingvo
- Leif Nordenstorm pri Sameaj lingvoj, Finna lingvo kaj Tornivala lingvo

12.00 Lunĉo
13.00 SEF-jarkunveno
15.00 Kafo
15.30 Mireille Grosjean: Kio estas bona instruisto? kaj jarkunveno de Sveda sekcio de ILEI
17.00 Koncerto/kantado
18.00-20.00 Manĝo

## Dimanĉe 2 junio 2019

11.00 Ekskurso al la poŝta muzeo

## Niaj prelegantoj

**Mireille GROSJEAN** estas prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Ŝia denaska lingvo estas la franca kaj ŝi loĝas en Svislando. Ŝia preleglisto entenas 54 titolojn. El tiu listo ŝi prelegos pri tri tre malsamaj temoj en la kongreso: Tra centraziaj stepoj, Esperanto en Afriko kaj Kio estas bona instruisto?

**Christer KISELMAN** estas sveda matematikisto. Kiselman membras en Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino kaj en Akademio de Esperanto. Li studis la jidan lingvon kaj esploris pri praformoj de Esperanto. En la kongreso li prelegos pri La jidogramatiko de Zamenhof kaj liaj kvin planlingvoj.

**Leif NORDENSTORM** estas direktoro de la teologia kursejo Fjellstedtska skolan. En la kongreso li prelegos pri Sameaj lingvoj, Finna lingvo kaj Tornivala lingvo

**Tatu LEHTILÄ** estas asistanto en la faksekcio pri lingvistiko en Stokholma universitato. Li prelegos pri Sveda signolingvo.

Tio signifas ke pluraj prelegoj en la ĉi-jara kongreso temo pri lingvoj de agnoskitaj malplimultoj en Svedio. Alia temo en la programo estas kantado kaj/aŭ koncertoj. Ni tamen ankoraŭ ne povas prezenti kio okazos dum tiuj horoj.